

Johann Wolfgang von Goethe,  
Elfregho

*tradukita de Richard Schulz*

Malfrua ĉeval' en nokta vent'?  
La patro estas en korturment'.  
Enbrake tenas infanon li,  
sekure, tamen kun zorg' pri ghi.

Fileto, kial vi timas nur? -  
Eksonas, paĉjo, elfa murmur'.  
Jen glitas reĝo kun elfoj mil. -  
Nebul' ĝi estas, mia fil'. -

“Ho, ĉarma knabo, sekvu min!  
Juvelojn havas mia patrin'.  
Kolorajn florojn ricevos vi,  
Kaj vi ludos gaje kun papili'.”

Ho patro, ho paĉjo, la elfreĝo jen!  
Li logas min for al luksa festen'! -  
Ne timu! Dormu, mia etul'.  
Susuras arboj en la nebul'. -

“Nu venu, fajna knabo, kun mi!  
La princinoj zorgos kun ĉarm' pri vi.  
La princinoj dancos dumnokte en rond'  
Kaj kante vin lulos en bela rotond'.”

Ho patro, ho paĉjo, filinoj de l' reĝ'  
Insidas tie malantaŭ la heĝ'. -  
Mi bone vidas, mia filet',  
De grizaj salikoj jen estas aret'. -

“Mi nepre vin bezonas por mia eskort'.  
Se vi ne konsentas, estiĝu perfort'!” -  
Ho patro, ho paĉjo, ve, kia krue!'  
Elfreĝo venis al sia cel'! -

La patro rajdas kun granda rapid'.  
Li timas. En brak' lia ĝemas la id'.  
Li pene venas al la kort'.  
La knabon prenis jam for la mort'.

...

Johann Wolfgang von Goethe,  
Elfregô

*tradukita de Joachim Gießner*

Rajdadas tra vent' kaj noktnebul'  
la patro kun febranta etul'.  
La knabon firmtenas sur sia sel'.  
brakŝirmas lin varme sub mantel'.

“Ho fil', vi tremas, ŝvitperlas la frunt'“?”  
“Jen, patro, elforeĝ' en profund',  
la elforeĝo kun kron' kaj trenaj'.”  
“Filet', nebul' nur kaj arbaĵ'.”

“Vi ĉarma knab', ho, venu nun,  
ni kune ludos en bril' de lun'.  
Kaj buntaj floroj ĝojigos vin,  
orajn vestojn havas mia patrin'.”

“Ho patro, ho patro, ĉu aŭdas ne vi?  
L'elfreĝo dolĉe promesas al mi.”  
“Karulo, trankviliĝu, infan',  
susuras vento tra seka kan'.”

“Vi, ĉarma knab', akompanu min,  
la filinoj vartos, dorlotos vin.  
La filinoj dancos en nokta rondad',  
vin lulos kaj kantos por via dormad'”.

“Ho patro, ho patro,” ĝemegas la fil',  
“elfinoj jen kun obskura bril'!”  
“Filet', filet', ekkonas mi ĝin,  
salikoj la grizaj trompas nur vin.”

“Mi amas vin, allogas min via belec',  
kaj se vi ne volas, vin venkos fortec'!”  
“Ho, patro, li venas, nun sentas mi lin!  
Elfreĝo krude perfortas min.”

Rapid-horora la patra rajdad' -  
en brak' aŭdiĝas singulta ĝemad'.  
Kun pen' li venas ĝis la kort',  
prenita estas la knab' - de l'mort'.

...

*Traduko de la Germana poemo “Erlkönig” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26).*

*Arg-588-1186 (2014-03-14 13:06:19)*

*Tiu ĉi traduko aperis en 1981-07-01 en la Vestfaliaj Flugfolioj, kiujn eldonis Richard Schulz (Rikardo Ŝulco) mem. Pri Richard Schulz vidu la vikipedia retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*

*Traduko de la Germana poemo “Erlkönig” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-588-1242 (2012-10-18 16:09:46)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.*